

N. N. 32,
Rozbranço
forĝermadis

tradukita de Felix Ney

Rozbranço
forĝermadis
el trunk' de nobelec'.
Prauloj jam kantadis:
de Jiŝaj ĝia spec'.
Floreton portis ĝi,
en akra vintro estis,
Je horo de noktmez'.

La branço anoncita
Jesaja de profet':
Maria netuŝita,
de kiu la floret'.
Eterne volis Di':
naskinta infaneton
Plej pura restis ŝi.

De tiu eta floro
alvenas bonodor'
Ĝi brilas en la koro,
mallumon pelas for.
Homido, Dia Vort',
nin el sufero helpas,
De pek' Savant' kaj
mort'.

...

N. N. 32,
En rose så jeg
skyde

*tradukita de Thomas
Laub*

En rose så jeg skyde
op af den frosne jord,
alt som os fordem
spåde
profetens trøsteord.
Den rose spired frem
midt i den kolde vin-
ter
om nat ved Bethle-
hem.

For rosen nu jeg
kvæder
omkap med Himlens
hær:
en jomfru var hans
moder,
Maria ren og skær.
I ham brød lyset frem
midt i den mørke vin-
ter
om nat ved Bethle-
hem.

Den rose fin og lille
har dejlig duft og
skær,
den lyse for os ville
og sprede mørket her.
I sandhed mand og
Gud,
af syndens nød og pi-
ne
han nådig hjalp os
ud.

...

N. N. 32,
Es ist ein Ros
entsprungen

*tradukita de Thomas
Laub*

1. Es ist ein Ros entsprun-
gen
aus einer Wurzel zart,
wie uns die Alten sungen,
von Jesse kam die Art
und hat ein Blümlein
bracht
mitten im kalten Winter,
wohl zu der halben Nacht.

2. Das Röslein, das ich
meine,
davon Jesaja sagt,
ist Maria die reine,
die uns das Blümlein
bracht.
Aus Gottes ewgem Rat
hat sie ein Kind geboren
und blieb ein reine Magd.

3. Das Blümelein so klei-
ne,
das duftet uns so süß,
mit seinem hellen Scheine
vertreibt's die Finsternis:
Wahr' Mensch und wahrer
Gott,
hilft uns aus allem Leide,
rettet von Sünd und Tod.

...

N. N. 32,
Burĝonis ro-
zarbedo

*tradukita de Guido
Holz*

1. Burĝonis roz-
arbedo
el delikata sin'
laŭ olda kant-
heredo,
Jiŝaj la origin';
ekĝermis ĉarma flor'
dum frosta vintro-
tempo
je noktomeza hor'.

2. El virgulin' bea-
ta,
mirinda roz-arbed',
elvenis flor' benata
laŭ diro de profet'.
Laŭ sankta Di-
ordon'
ŝi naskis infaneton
por nia sav' kaj
bon'.

3. Kaj ĉi floreto be-
las,
amindas per par-
fum';
la nokton ĝi forpelas
per sia brila lum',
nin helpas el mizer',
el pek' kaj morto sa-
vas;
Li, hom' kaj Di' en
ver'.

...

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de Felix Ney.

Arg-618-1246 (2012-10-18 22:27:59)

Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la retejo <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbrancæ1.html>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en la Danan de Thomas Laub.

Arg-618-1249 (2012-10-19 19:29:42)

Tiu ĉi danigo de la kanto troviĝas en <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>. Vidu ankaŭ: http://da.wikisource.org/wiki/En_rose_s%C3%A5_jeg_skyde kaj http://www.ugle.dk/en_rose_saa_jeg_skyde.html. Pri Thomas Laub vidu la retejn http://de.wikipedia.org/wiki/Thomas_Laub.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas N. N. 32.

Arg-618-1243 (2012-10-18 21:49:44)

Tiu ĉi kanto-teksto troviĝas en la germana evangelia eklezia kantlibro, kanto n-ro 23. Vidu ankaŭ la retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Es_ist_ein_Ros_entsprungen. La teksto troviĝas ankaŭ en la retejo <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>. Tie estas aŭdebla ankaŭ la melodio.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de GUIDO HOLZ (*1920 – †1989).

Arg-618-1245 (2014-09-07 14:38:29)

Tiu ĉi kanto troviĝas en la eklezia Esperanta kantlibro “Adoru”, n-ro 223. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/b/burgæonis1.html>. Pri Guido Holz vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido_Holz.